************************************************************************

**INSTRU-CIRKULERO 2011/2 (decembro 2011)**

Neregula informilo pri E-instruado, novaĵoj, projektoj, renkontiĝoj

************************************************************************

Karaj Gekolegoj,

Mi elektis por vi kelkajn gravajn informojn el la lastaj monatoj kaj alvokas pri eventoj en 2012.

**KVHS-kurso: Bildungsurlaub 5-9 marto 2012**

Post sukcesa kurso en 2011 estos denove ebleco lerni Esperanton en formo de intensa klerigcela laborforpermeso (Bildungsurlaub). Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg organizos tiun oficialan lingvokurson kun la popolaltlernejo KVHS Osterode inter 5-9 marto 2012. Ĝi taŭgos kaj por progresintoj kaj por komencantoj. Laŭ niveloj vi povos lerni, eĉ spertiĝi pri metodiko dum 40 instruhoroj gvidataj de Zsofia Korody kaj Peter Zilvar.

Aliĝu ĉe Interkultura Centro Herzberg, 37412 Herzberg am Harz, Grubenhagenstr. 6
zsofia.korody@esperanto.de aŭ/kaj ĉe KVHS
http://www.kvhs-osterode.de/kursdetails.php?KursID=11515

Detalojn, sciindaĵojn pri "Bildungsurlaub" bv. legi ankaŭ sur la ĉefpaĝo de GEA, alklaku supre la butonon "Bildungsurlaub". La rekta adreso estas
http://esperanto.de/gea/bildung.html
Raporto kun horaro kaj tematiko pri la lasta klerigsemajno (Bildungsurlaub 2011) estas legebla ĉi tie:
http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=62390475

**Membrokotizo**

La komitato de ILEI akceptis modestan altigon de la membro-kotizoj ekde 2012 sed ĝis la jarfino ILEI akceptas kotizojn laŭ la nunaj prezoj. Por membroj de AGEI ni prizorgos la ĝustatempan kotizpagon por 2012 kaj en la nova jaro ni pagos laŭ la kutima maniero la jam iom pli altan kotizon por 2013. La AGEI-membrokotizo ne ŝanĝiĝos.

Novaj membroj, se vi nun ŝatus esti membro de AGEI kaj subteni la multflankan agadon, la klerigadon, pluklerigadon de Esperanto-instruantoj kaj la instruadon de Esperanto en Germanio, bv. anonci al ni, ke ni povu pagi vian membrokotizon al ILEI por 2012.

Individuaj membroj de ILEI, kiuj ne estas AGEI-membroj, bv. mem zorgi pri la pagado laŭ la ĉi-subaj kotizkategorioj.
Por novaj membroj aliĝilo troviĝas ĉe la AGEI-retpaĝo http://esperanto.de/agei sub menupunkto Aliĝo aŭ petu tion de mi. Viajn demandojn pri membriĝo, kotizado bv. sendi al nia kasisto: Christoph Krick, Günninghauser Str. 11a, 59955 Winterberg, christof.krick@esperanto.de

Juna Amiko abono por 2012 kaj 2013: la kotizaltiĝo (2 eŭroj pli) validas ankaŭ por abonoj al Juna Amiko. Ĝis la fino de decembro vi povas pagi por la sekvaj du jaroj laŭ la ĝisnuna tarifo.
Komence A-lande, poste B-lande

| | | |
|---|---|---|
| Membreco - IPR presa | € 18€ (-->20€) | 9€ (->10€) |
| Membreco - IPR reta | € 8€ (-->10€) | 4€ (--> 5€) |
| Juna Amiko - jarabono | € 14€ (-->16) | 9€ (->11€) |
| JA ekde 3 ekz., po | € 11€ (-->13€) | 7€ (--> 9€) |

Antaŭdankon pro via abono, subteno!

**Varbado**

La nova numero de IPR (2011/4) baldaŭ aperos kaj atingos vin. Se vi trovas varbilon kun via revuo, bv. uzi ĝin por varbi por ni novajn membrojn!

**Lerneja, universitata instruado**
Kiel ĉiujare, ankaŭ nun ni alvokas ĉiujn gekolegojn raporti pri Esperanto-instruado en lernejoj, univeristatoj. La informojn bv. mem anonci per la formularoj ĉe http://edukado.net/kursejo

La nuna stato laŭ tio en Germanio: Lerneja kurso en 4 lokoj
1. Winterberg: Gymnasium Winterberg - Christof Krick
2-4. Herzberg am Harz: Haupt- und Realschule, Nicolai-Bazlernejo, E-M-A Gimnazio - Zsófia Kóródy kaj Ewa Kukielka

**Universitataj kursoj** (en 3 lokoj laŭ la listo de Germain Pirlot):
1. Emden – Sebastian Kirf, 2. Münster – Rudolf Fischer, 3. universitato de la tria aĝo: Münster – Rudolf Fischer, 4. universitata E-kurso de Johannes Mueller en Stuttgart.

Estas gratulinda la laboro de tiuj gekolegoj, kiuj anoncas porokazan instruadon, projekttagon aŭ/kaj faras informlaboron al lernejanoj.
Laŭ miaj informoj ankaŭ en Erfurt kaj Dresden okazas lerneja Esperanto-instruado en gimnazio.
En la evangelia konsilantargimnazio (germane: Evangelisches Ratsgymnasium Erfurt (http://www.evrg-erfurt.de) en Erfurt Bernhard Schwaiger faris ankaŭ la Esperanto-tradukon de la lerneja broŝuro kaj aperigas novaĵojn pri Esperanto sur la lerneja hejmpaĝo.
(http://www.evrg-erfurt.de/fileadmin/PDF/La_Evangelia_Konsilantargimnazio.pdf)

En aŭgusto en Herzberg/Sieber en Somera Arbara Lernejo (SALO-6) jam la 6an fojon renkontiĝis lernejanoj el la ĝemelurboj Góra, Pollando kaj Herzberg. La 12-17 jaraj gejunuloj dum unu semajno kune lernis Esperanton kaj uzis la lingvon dum la libertempaj aktivecoj kaj ekskursoj. Fotoj, detaloj: http://esperanto-urbo.de/gallery.php?gallery_id=53023460

En novembro okazis interesa kunlaboro inter la lernejoj: 8-membra grupo el t.n. libera lernejo en Suda Koreio sub gvido de instruistino Sonĝanta kaj instruisto Suno staĝis en Herzberg am Harz dum pli ol 5 semajnoj. La gastiganto Interkultura Centro Herzberg organizis por ili vizitojn ankaŭ al la Esperanto-grupoj en Halle, Emden kaj Erfurt.
Kelkaj gazetartikoloj pri la korea grupo kaj aliaj eventoj estas legeblaj ankaŭ sur la hejmpaĝo de urbo Herzberg http://herzberg.de/magazin/magazin.php?menuid=377&topmenu=7&keepmenu=inactive

**Someraj kaj aŭtunaj eventoj**
**AGEI jarĉefkunveno**: la jarĉefkunveno de AGEI okazis la 11an de junio, 2011 dum la Germana-Nederlanda Esperanto-Kongreso (GEK) en Münster. Estis ĝojige la multnombra partopreno kaj la aktiva diskuto pri aktualaĵoj. La jarraporton pri la agado dum 2010 kaj la financan raporton vi povas legi ĉe la AGEI hejmpaĝo
http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652

Detaloj, fotoj pri la AGEI-kunveno, kaj la kongreso, kiujn partoprenis ankaŭ Stefan MacGill, prezidanto de ILEI
http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=32395226

**ILEI-konferenco 2011** en Kopenhago: Zsófia Kóródy reprezentis AGEI dum la komitatkunsido kaj ankaŭ prelegis pri instruado en naturaj cirkonstancoj, pri projektoj kaj subvencioj en la praktiko, kaj gvidis seminarion pri KER-ekzamenoj. La komitato traktis kelkajn statutmodifojn de ILEI kaj ellaboris alvokon, laborplanon por festi la 125an jubileon de Esperanto en 2012.

**Tago de la lernejo dum UK 2011** en Kopenhago: Zsófia Kóródy prelegis pri Esperanto-instruado kaj klerigado en Germanio kaj pri la rolo de Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg. Alia prezentado kun Peter Zilvar traktis la internacian kunlaboron de partneraj urboj, muzeoj, bibliotekoj kaj edukcentroj.

**Tradiciaj Oktobraj Pedagogiaj Tagoj (TORPEDO-7 30.09-04.10.2011)**, organizitaj de AGEI kaj ICH (Interkultura Centro Herzberg/Gemana Esperanto-Centro), ofertis du ĉeftemojn, du paralelajn programojn:
1. Esperantaj eduk- kaj kulturcentroj, muzeoj, bibliotekoj – Projekto PUNTO (Partnerurba Nodo-Teksaĵo) kaj
2. Cseh-metoda lingvoinstruado en praktiko (kun lingvokurso far Sabine Trenner)
La eventon partoprenis pli ol 30 homoj el 10 landoj parte dank' ankaŭ al la subvencio de Esperantic Studies Foundation. Inter la prelegantoj estis ekz. Dr. Detlev Blanke, Stefan MacGill, prezidanto de ILEI, Toon Witkam, reprezentanto de IEI, Francois Lo Jacomo, reprezentanto de la Esperanto-kastelo en Grésillon, Ela Karczewska el Bjalistok, Podlahia Biblioteko, Smail Grbo el Bosnio-Hercegovino. En la programo estis ankaŭ vizito al la urba biblioteko, al la Esperanto-muzeo en la Welf-kastelo.
http://esperanto-urbo.de/blog.php?blog_id=16093126&edit_blog_id=16093126

**Projekto PUNTO** baziĝas sur la jam komencita kunlaboro inter ICH kaj kelkaj bibliotekoj, muzeoj kaj Esperanto-centroj. Ni komencis novan retpaĝaron por priskribi la celojn, raporti pri la ĝisnunaj kunvenoj por bibliotekistoj, kolektantoj, fakuloj kaj por prezenti la kunagadantajn partnerojn:
http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=90666942

**Projektoj**
**Grundtvig**
La trilanda EU Grundtvig-projekto inter PL, SK kaj DE estis finita en septembro. Jen detaloj:
http://esperanto-urbo.de/page.php?pid=40542015

La celo de la 2-jara projekto kun la titolo: „La plej rekta vojo al aktivigo de la popolo 55+ pere de speciala eduka programo” estis klerigi Esperanto-instruantojn el la tiel nomata tria aĝo. Pri la tre sukcesa projektoj nome de la germana partnero Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg Zsofia Korody kaj Peter Zilvar prelegis dum GEK 2011 kaj ankaŭ dum UK en Kopenhago. En septembro la polaj projektpartneroj vizitis la Esperanto-urbon Herzberg kaj tuj poste la tri partneroj (PEA, E@I kaj ICH) pretigis la finan raporton, finredaktis 4-lingvan retpaĝaron de la projekto kaj eldonis broŝuron pri la kunlaboro kaj rezultoj.
http://eo55.ikso.net/doku.php?id=start

**Esperanto 125**
Esperanto estos 125-jara – okazo kaptinda! Jen alvoko de Stefan MacGill, prezidanto de ILEI:
„En la 26a de julio 2012, ni festos la 125-jaran jubileon de la apero de la Unua Libro de Esperanto. Ekspluatinda okazo – kaj por varbado, kaj por kursdonado. ILEI ekde septembro 2010 prenis gvidan rolon en tio – vidu revuon Esperanto de aprilo 2011. Ni kompilas kaj akceptigas malgrandan internacian liverteamon por kunordigi la landajn agadojn..... La teamo diskonigos plie landajn planojn, kaj pretigos konsilarojn pri la ebloj konigi la jubileon kaj oferti kursojn.
La ideo de ILEI estas oferti kursojn, el kiuj iuj povus havi 125 partojn (etapojn) – plenumeblaj rete tra la 125 tagoj antaŭ la jubileo, do inter la 23a de marto kaj la 26-a de julio. ...Tiu kurso estos nur cel-lingva kaj memklariga.”
La kunordiganto de la E-125 projekto en Germanio estas Christof Krick (christof.krick@esperanto.de), bv. skribi al li por konsilo kaj pri viaj lokaj, regionaj planoj.

**Lingvokursoj**
Ankaŭ en 2012 okazos regulaj lingvokursoj en ĉiuj niveloj, lingvokursoj por preparo al ekzamenoj, ktp.) en intensa semajnfina formo en Herzberg am Harz. La sekvaj:
2012 februaro 3-5 (kun vintra migrado en la Harz-montaro)
2012 marto 5-9 (tutsemajna intensa VHS-kurso, Bildungsurlaub!)
2012 marto 16-18 (semajnfina lingvoekzercado, ekskurso al Marienburg/Hildesheim)
2012 aprilo 27-majo 1 (kun Valpurg-nokta programo en la Harz-montaro)
2012 majo 19-25 (kurso dum la 64a Internacia Fervojista Kongreso http://ifk64.esperanto-urbo.de)
2012 junio 07-10 (intensa, ankaŭ bona por prepariĝo al KER-ekzamenoj, okazontaj la 9an de junio)
2012 julio 13-20 (somerferiaj intensaj kursoj A1-C2, preparo al KER-ekzemanoj)

2012 julio 20-27 (somerferiaj intensaj kursoj A1-C2), preparo al KER-ekzemanoj
2012 oktobro 19-21 (semajnfinaj kursoj en diversaj niveloj)
2012 novembro 15-18 (semajnfinaj kursoj en diversaj niveloj)

**Klerigsesioj**
La klerigsemajnfinoj, studmoduloj de GEA-Filio en Herzberg am Harz por bonaj lingvouzantoj, pluklerigemuloj kaj movadaj fakuloj:
2012 februaro 17-19: 54a Studmodulo. Ĉeftemo: Esperanto en la sciencoj, faka uzo de la lingvo
2012 marto 5-9: metodika spertiĝo, intensa kurso dum VHS-kurso (Bildungsurlaub)
2012 junio 15-17: 55a Studmodulo.
**2012 julio 13-27: 2-semajna instrukapabliga kurso laŭ ILEI-postuloj,** staĝado, metodika spertiĝo
2012 septembro 13-16: seminario pri Nacia Parko Harz kun tradukado kaj migrado al Brocken
2012 septembro 28-oktobro 3: TORPEDO-8 Pedagogiaj tagoj, 56a Studmodulo. Ĉeftemo: vortaroj, terminologia laboro, vortprovizo por ekzamenoj, instrumetodoj por plilarĝigo de vortprovizo
2012 decembro 14-16: 57a Studmodulo, tradicia jarfina Zamenhof-festo la 15an de decembro

**Ekzamenoj**
**Gratulojn!** La 8-an de oktobro okazis KER-ekzameno en Herzberg am Harz: 5 personoj, inter ili du 17-jaraj gimnaziaj lernantinoj, sukcese trapasis B1 nivelon! Estas gratulinda la bona rezulto, kiun ili atingis per la lerneja Esperanto-instruado ofertata de Zsofia Korody. Helpis al ili perfektiĝi en la lingvo la partopreno en la Someraj Arbaraj Lernejoj (SALO) kaj en Internaciaj Infanaj Kongresetoj (IIK).

**Tutmonda Skriba Sesio de la UEA/ITK KER-ekzamenoj**
La ekzamena komisiono de UEA decidis oferti tutmondan, nur SKRIBAN ekzamensesion por la
**9a de junio 2012 en niveloj B1, B2 kaj C1.**
La "nur-skriba sesio" signifas, ke post sukcesa ekzameniĝo la kandidatoj akiros atestilon de ITK, sed nur pri la skriba parto, kaj iam, aliokaze, se ili bezonus kaj volus, ili povus trapasi nur la parolan parton pri kiu ili havos apartan atestilon. La du ekzamenpartoj kune konsistigas la kompleksan ekzamenon, sed ne necesas trapasi ambaŭ partojn por akiri atestilon. KER-ekzamenoj@edukado.net.
Estroj de kluboj, grupoj kaj kursoj, kiuj volas aliĝi al la sesio okazigota en junio 2012 bv. legi la pli detalajn informojn kaj kondiĉojn kaj kontaktu la komisionon ĉe
Notu: en Herzberg ankaŭ la PAROLA parto okazos la 9an de junio.

**La testlibron 'Esperanto de nivelo al nivelo',** kiu enhavas po 2 seriojn en B1, B2 kaj C1 niveloj, vi povas aĉeti (10,50 EUR) ĉe Interkultura Centro Herzberg aŭ estas mendebla de Zsofia Korody.

**ILEI-konferenco 2012**
ILEI konferencos en Ĉinio en la jaro 2012, dum la semajno antaŭ UK en Hanojo.
Konferenca urbo: Kunming, provinco Yunnan en suda Ĉinio
Datoj: 20-26 julio 2012
Konferencejo: Profesia Artkolegio de Kunming
Loĝado kaj manĝoj: 3-stela hotelo ene de la kolegio
Transporto al Hanojo por UK: flugo 1,5 horojn, aŭ tuttaga postkonferenca ekskurso per buso ĝis la vjetnama landlimo + litvagonare ĝis Hanojo
Detaloj aperos en la sekva numero de IPR kaj sur la hejmpaĝo de ILEI http://ilei.info

Nome de la AGEI-estraro mi deziras bonan sanon, agrablajn festotagojn, multe da ĝojo al ĉiuj membroj de AGEI kaj al ĉiuj, kiuj interesiĝas pri Esperanto-instruado. Dankon pro via membriĝo, helpema laboro, financa subteno!

Korajn salutojn de Zsófia Kóródy
prezidanto de AGEI